

Johann Wolfgang von Goethe,  
Kanto de la spiritoj super la akvoj

*tradukita de Willy Nüesch*

La homanimo  
Similas al akvo:  
De l' ĉielo ĝi venas,  
Al ĉielo ĝi iras,  
Kaj infren ree  
Al tero ĝi devas,  
En ŝanĝo eterna.

Kiam de l' alta,  
Kruta rokmuro  
Fluas la pura radio,  
Ĝi polvas plaĉe  
En nubaj ondoj  
Al glata roko,  
Kaj mildakceptite  
Ĝi ondas vuale,  
Softmuĝe  
Al la profundo.

Kaj se rifoj  
Kontraŭas la falon,  
Ĝi ŝaŭmas indigne  
Ŝtup-post-ŝtupe  
Abismen.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Kanto de la spiritoj super  
la akvoj

*tradukita de Karl Jost*

La homa animo  
similas al akvo,  
de l' ĉielo ĝi venas,  
al ĉielo ĝi iras,  
kaj devas denove  
reveni al tero,  
daŭre ŝanĝante.

Torrente de l' alta  
kruta roklando  
pura la akvo  
ĉarme disŝprucas  
je nubondoj  
sur glatan rokon,  
kaj facilkviete  
fluas nubvuale,  
murmure  
en la profundon.

Se staras rifoj  
al falo kontraŭe,  
ĝi ŝaŭmas kolere,  
ŝtup-al-ŝtupe  
abismen.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Gesang der Geister über den Wassern

Des Menschen Seele  
Gleicht dem Wasser:  
Vom Himmel kommt es,  
Zum Himmel steigt es,  
Und wieder nieder  
Zur Erde muß es,  
Ewig wechselnd.

Strömt von der hohen,  
Steilen Felswand  
Der reine Strahl,  
Dann stäubt er lieblich  
In Wolkenwellen  
Zum glatten Fels,  
Und leicht empfangen,  
Wallt er verschleiern,  
Leisrauschend  
Zur Tiefe nieder.

Ragen Klippen  
Dem Sturz entgegen,  
Schäumt er unmutig  
Stufenweise  
Zum Abgrund.

...

En malprofunda fluejo  
Ĝi rampas tra l' valo herbeja,  
Kaj en la glata lago  
Paŝtas sian vizaĝon  
Astroj ĉielaj.

Vent' 'stas amanto  
Ĉarma de l' ondo,  
Vent' miksas funde  
Ondojn ŝaŭmantajn.

Vi, homa animo,  
Similas al akvo.  
Vi, sorto de l' homo,  
Similas al vent'.

...

Nun malrapide  
ĝi trarampas la valon,  
kaj en glata la lag'  
respegulas sin.  
ĉiuj la astroj.

Vent' estas al ondo  
ĉarma kunulo;  
vent' kirlas el fundo  
ŝaŭmantajn ondegojn.

Animo de l' homo,  
vi similas al akvo!  
Sorto de l' homo,  
al vent' similas ja vi.

...

Im flachen Bette  
Schleicht er das Wiesental hin,  
Und in dem glatten See  
Weiden ihr Antlitz  
Alle Gestirne.

Wind ist der Welle  
Lieblicher Buhler;  
Wind mischt vom Grund aus  
Schäumende Wogen.

Seele des Menschen,  
Wie gleichst du dem Wasser!  
Schicksal des Menschen,  
Wie gleichst du dem Wind!

...

Traduko de la Germana poemo “Gesang der Geister über den Wassern” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).

Arg-504-1025 (2013-08-28 18:48:20)

La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en la interreta poem-kolekto “Argiope.poezio.net”.

Traduko de la Germana poemo “Gesang der Geister über den Wassern” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KARL JOST (\*1876 – †1952).

Arg-504-989 (2010-01-11 12:54:14)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la revuo “Heroldo de Esperanto”, n-ro 9 (1144), 27-a jarkolekto, de l’ 1-a de junio 1951. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.literaturo.dk/spiritoj.htm>. S-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danio, [lars.kromann@mail.dk](mailto:lars.kromann@mail.dk)) enmetis ĝin tien. Karl Jost estis tre aktiva Esperantisto loĝinta en la svisa urbo Zuriko. Li estis kunfondinto de la Zurika Esperanto-Societo kaj verkis multajn tradukojn, lerno-libron de Esperanto kaj aliajn Esperantaĵojn. Vidu ankaŭ la retejon [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch)

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-504-988 (2010-01-10 17:18:40)